Chu Fu vidas
(Csu Fu látja)

al memoro de T. Gy.

Chu Fu vidas
dismolighantan kolonon
de Drangalag
kadukighantan arkon
de sia kelo
sarkoplenan
stuparon de la monto.
Inter
putrighantaj vinberpalisoj
la teron de neniu.
Iam
lian vinon trinkis
multaj amikoj
kaj dio imagitaj
senmerituloj
kiuj supreniris
inter la rokoj
al la domo.
Sed jen, hodiau jam
nek la cezaro
nek unusola regho
promenas
chi tie
nek sagha scinculo
au povra poeto..
Kvankam ekaperas la luno
la steloj
kiel chiam
kaj sur la surfaco de l' akvo
la ponto
dumnokte kelkfoje
ekbrilas……
Sed ve,
Chio chi tio vane.

Chu Fu vidas
kaj scias jam,
revenos
nenio.
Char la estis,
estis do restis,
kaj rustaj ghiaj shlosiloj
ne malfermas
la pordegojn
nuntempajn.

Tradukita de János Ruff